startejo

12€

10€

ŝuoj 12€

vazo 10€

glasojn 6€

aŭteto 9€

5€

rozoj 11€

pano 2€

libro 8€

kukoj 5€

laŭvola aĉeto

akvo 4€

jogurtoj 7€

citrono 1€

pomoj 3€

kukoj	akvo	libro	citrono
aŭteto	rozoj	jogurtoj	pano
ŝuoj	pomoj	vazo	glasoj

Por 24 varkartoj, presu dufoje ĉi-paĝon.

Ludreguloj

Ĝis 4 ludantoj.

Necesaĵoj :
La ludtabulo, peonoj, ĵetkubo, varkartoj, moneroj (falsaj moneroj sufiĉas).

La ludocelo :
Celas aĉeti varojn plejeble multe.

Preparo antaŭ la ludo :
Iu iĝas la kasisto.
Li zorgos enkasigi la monon kiam okazas aĉeto, kaj redoni monerojn kiam necesas.
Komence de la ludo, li disdonas po 12 eurojn al ĉiu ludanto.
Li elmetas videble la 12 (aŭ 24) varkartojn meze sur la tablon.

Ĉiu ludanto elektas peonon kaj metas ĝin sur la startan ĉelon.

Por ludi :
La ludanto rulĵetas la ĵetkubon.
Li antaŭenigas sian peonon laŭ la lotita numero de la ĵetkubo.
Laŭ la atingita ĉelo, vidu instrukciojn ĉi-flanken.

Fino de la partio :
La ludo daŭras ĝis kiam la varkartoj elĉerpiĝas.

Kiam ne plu restas vendotaj varkartoj, la ludanto kiu akiris la plej multe da varkartoj gajnas.

Aĉetu

Blua ĉelo :

Faru laŭvole :

- Aĉeti la varkarton kondiĉe, ke vi havas sufiĉe da mono kaj, ke la karto ne estas jam aĉetita.
- Nenion fari.

Parkejo :

Pagu 5 eŭrojn. La kasisto enkasigas ilin.

5 eŭroj :

Ricevu 5 eŭrojn de la kasisto.

Ĵokero :

Vi rajtas aĉeti laŭvolan varkarton. Se vi aĉetas ion, metu vian peonon sur la elektitan varĉelon ; transiru la startejon sen ricevi 10 eŭrojn.

Startejo :

Ricevu 10 eŭrojn de la kasisto.
Ĉiu ludanto kiu trapasas tiun ĉelon ricevas 10 eŭrojn.

Aŭtorinoj : Marie Sylvie Julian, Annette Chadelaud, Isabelle Saulnier.